

La Riverego

Kebekia esperantista bulteno

MEKARO en Kebeko !.....	2	Ĉu fino de la Libroservo de KEA ?	11
En 2012 ni festu 125 kaj 30 !.....	3	La Universala Lingvo sur DVD	12
Interlingua	4	Nova loko por la biblioteko ?	13
100 W = 1 homa sklavo !	9	L'espéranto à Google Traduction.....	14
NASK en Teksaso	10	BÉPO.....	16

MEKARO 2012 : bonvenon al Kebeko !

MEKARO 2012 : *bienvenus à Québec !*



MEKARO 2012 en Kebeko bonvenigas vin !

Jam ekfunkciis la retejo de MEKARO 2012: mekaro.ca. MEKARO estas la Mez-Kanada Renkontiĝo de esperantistoj. Ĉiujare dum la longa semajnfino en majo (ĉi-foje, la 19-21an de majo) ni kunvenas en malsama urbo, alterne en Ontario aŭ Kebekio, kaj ĉi-jare estas la vico de la urbo Kebeko por gastigi MEKAROn.

Pro ĝia ĉarmo, Kebeko estas unu el la plej vizitataj urboj en Norda Ameriko. El ĉiuj urboj de Kanado kaj Usono, ĝi estas la sola, kiu konservis siajn malnovajn remparojn kaj aliajn defendajn fortikaĵojn. En 1985, UNESCO deklaris la malnovan urbon de Kebeko Monda Kulturheredaĵo.

MEKARO estas turisma semajnfino en Esperanto por lerni pri la gastiga urbo, gustumi la lokajn frandaĵojn (kaj bierojn), ekkoni novajn esperantistojn, revidi malnovajn amikojn kaj simple pasigi tempon en bela varma esperantista etoso. Aliĝu nun!

Vizitu la retejon mekaro.ca. Por pli da informoj, skribu al [informo\(ĉe\)esperanto.qc.ca](mailto:informo(ĉe)esperanto.qc.ca).

Noto: se vi iras al mekaro.ca kaj vidas malnovajn informojn, bv. forviŝi la kaŝmemoron (kutime, Iloj [Tools] => Forigi retumajn datenojn [Clear browsing data]). Poste reŝargu la paĝon.

Participez à la MEKARO 2012 à Québec !

La page web de la MEKARO 2012 vient d'être mise en fonction à l'adresse mekaro.ca. Il s'agit de la Rencontre espérantiste du Canada central. Chaque année, durant la longue fin de semaine de mai (cette fois du 19 au 21 mai), nous nous réunissons dans une ville différente, alternativement en Ontario et au Québec. Cette année, c'est la ville de Québec qui accueillera la rencontre.

Québec, avec son cachet unique, est une des villes d'Amérique du Nord les plus visitées. C'est la seule ville du Canada ou des États-Unis qui a gardé ses anciens remparts et autres ouvrages défensifs. Depuis 1985 la vieille ville de Québec fait partie de la liste du patrimoine mondial de l'UNESCO.

La MEKARO est une fin de semaine touristique en espéranto, durant laquelle vous pourrez visiter la ville-hôte, goûter les spécialités (et bières) locales, rencontrer de nouveaux espérantistes, revoir d'anciens amis et simplement jouir d'une atmosphère espérantiste chaleureuse. Inscrivez-vous maintenant !

Visitez le site mekaro.ca. Pour plus d'information, écrivez à [informo\(à\)esperanto.qc.ca](mailto:informo(à)esperanto.qc.ca).

Note. Si à l'adresse mekaro.ca vous voyez des informations périmées, veuillez vider la mémoire-cache de votre fureteur (dans certains fureteurs on peut faire cela en exécutant, par le menu Outils, une commande dont le nom ressemble à Supprimer les données de sites web..., ou Vider le cache...). Puis rechargez la page.

En 2012 ni festu 125 kaj 30 !

Normando Fleury, prezidanto de ESK

Nous fêterons en 2012 le 125e anniversaire de l'espéranto (créé en 1887), mais aussi le 30e anniversaire de la Société québécoise d'espéranto (fondée en septembre 1982). Vos idées, ainsi que votre aide, seront très appréciées !

Jen 2012 estas speciala jaro. La lingvo Esperanto festas sian 125-an jaron ĉar ĝi estis kreita en 1887. Krome, Esperanto-Societo Kebekia fondiĝis en 1982, do ESK festos sian 30-jariĝon en septembro 2012.

La estraro komencis pripensi, kion ni povus fari, sed, sen via kunhelpo, la estraro ne povos multon fari. Mi prezentas al vi kelkajn ideojn. Anoncu vin se vi ŝatus kunlabori kun ni!

- Organizi prelegojn pri la historio de Esperanto kaj ĝia aparta kulturo kaj movado.

- Organizi gazetar-konferencon kun estraranoj de Esperantic Studies Foundation, kiam ili kunvenos en Montrealo komence de julio 2012.

- Organizi piknikon en la parko Albert-Saint-Martin (li estas inter la unuaj Esperantistoj en Kebekio) en Montrealo, iam en septembro 2012. Tiu parko situas angule de la stratoj Berri kaj de Bienville, proksime kaj norde de la metrostacio Mont-Royal.



- Havi tablon pri Esperantaj libroj dum *Le Salon du livre* en Montrealo, en novembro 2012.

- Organizi grandegan feston kun komuna manĝo en decembro 2012, invitante ankaŭ eksajn membrojn kaj ĉiujn kebekiajn esperantistojn.

- Varbi novajn membrojn por atingi 125 fine de la jaro.

Kiel vi vidas, la ideoj ne mankas... sed helpo estas necesa. Ĉu vi ŝatus respondi pri unu el tiuj ideoj? Ĉu vi havas plian proponon por festi la 125-an kaj la 30-an?

Kompreneble, ni ankaŭ organizos la printempan renkontiĝon MEKARO en Kebeko kaj la aŭtunan semajnfinojn ARE en Novjorkio. Notu, ke eblas jam aliĝi al ambaŭ aranĝoj. Simple vizitu la retejon www.esperanto.qc.ca por pliaj informoj.

Ne hezitu kontakti nin, ni ĝojos aŭdi de vi : [informo\(ĉe\)esperanto.qc.ca](mailto:informo(ĉe)esperanto.qc.ca)

Interlingua : latinidaj lingvoj por nekapabluloj

Silvano La Lacerto Auclair



Une présentation rapide de la seule autre langue construite à avoir eu un peu de succès, l'interlingua, une langue à apparence latine dont le principal atout est que les Occidentaux cultivés la comprennent sans même avoir à l'apprendre, ou si peu.

Se iu en la publiko konas unu artefaritan internacian helplingvon, ĝi certe estos Esperanto. Sed se tiu scias pri dua, tiu ĉi verŝajne estos Interlingua. Ĝi estas la ununura alia helplingvo, kiu spertis ioman sukceson, jam dum pli ol 60 jaroj.

Iel kiel Ido, Interlingua fontis el komitato, kiu devis eltrovi la plej bonan internacian helplingvon. En tiu epoko, la ideo de internacia lingvo estis jam irinta laŭ la vojo el Volapük ĝis Occidental, tra Esperanto kaj Ido, kaj sekve pli kaj pli celis tiel nomatan naturalismon, t.e. similecon al kelkaj okcidenteŭropaj lingvoj, unuarange la franca, ne forgesante la ankoraŭ multe scipovatan latinan lingvon ; tiujn du lingvojn oni ja konsideris pli belaj kaj bonaj lingvoj. Nu, la usona komitato, nome *International Auxiliary Language Association*, starigita en 1924, kaj en kiu membris la kreinto de *Latino sine flexione*, ne sukcesis trovi sufiĉe bonan lingvon, kaj

simple decidis krei novan, nomotan Interlingua*, kiu estis lanĉita en 1951. Iuj klaĉemuloj diras, ke ĉesado de ies privata stipendiado plifruigis tiun lanĉon.

Do aperis en 1951 anglalingvaj gramatiko kaj vortaro de la nova lingvo. Laŭ la esploroj de IALA, Interlingua estis lingvo tuj komprenebla al klera Okcidenteŭropano, kiu scipovis la latinan, la francan, la anglan (pro la granda nombro de latin- kaj franc-devenaj vortoj en ties vortaro), la hispanan aŭ portugalan (konsideratajn kiel ununuran lingvon de la esploristoj de IALA) aŭ la italan. Oni sufiĉe sukcese propagandis ĝin en sciencaj rondoj, kaj onidire iuj svedaj mezlernejoj instruis ĝin anstataŭ la latinan.

Vortaro

Treege multaj vortoj de Interlingua estos tuj rekoneblaj de, ekzemple, franclingvano. Vi verŝajne povos sen granda peno legi la apudan ekzemplon,

komencon de *La Dormanta Belulino* (tamen en iom plisimpligita formo kompare kun la nacilingvaj versioj). Tiu tuja rekonebleco estas la plej granda kaj grava kvalito de Interlingua : por lege kompreni ĝin, oni apenaŭ bezonas lerni ĝin. Nu, la fakto, ke tiu *oni* estas limigita al kelkaj Eŭropaj popoloj ne tro zorgigis la kreantojn de la lingvo.

La vortoj de Interlingua estas laŭdire elektitaj per komparo de kelkaj lingvoj, nome la franca, la angla, la itala kaj la hispana/portugala. Oni elektis la vortojn, kiuj ekzistas en tri el tiuj lingvoj ; se tia ne

Le princessa dormiente

Olim, in un pais multo lontan, habitava un rege e un regina qui desirava un baby. Multe annos passava ante que le desiro deveniva realitate e un parve puera nasceva.

Le rege e regina esseva multo felice, dunque illes celebrava un grande festa. Illes invitava tote lor amicos e il habeva multe jubilo in le castello.

Le fees del regno etiam esseva invitate e post le festa tote le fees amabile vadeva al camera del parve princessa. Un post le altere exprimeva lor desiros: que illa poterea devenir belle, intelligente e amabile. Durante que le fees diceva lor desiros, le porta se aperiva e un fee malitiose entrava.

estas, oni elektis vortojn ekzistantajn en du el tiuj lingvoj plus la germana aŭ la rusa. Alie, kaj ĉefe por gramatikaj vortoj, oni ĉerpis el la latina — kiel ofte faras Esperanto.

Tiu estas la teorio. Ni konsideru la vorton *aĉeti*. En la franca, ĝi estas *acheter* ; en la angla, *to buy* ; en la itala, *comprare* ; en la hispana kaj portugala, *comprar*. Preskaŭ venkas la formo *comprar*, kiu tamen ekzistas nek en la germana – *kaufen* – nek en la rusa — *купить*. Ĉu tiam elekti la latinan formon ? Ĝi estas *emere* (kiel en la franca *préemption*). Tial, supozeble, oni elektis la vorton *comprar*...

Krome, por multaj vortoj ekzistas kvazaŭe du diversaj lingvoj. Por meti demandon, oni aŭ inversas la verbon kaj la subjekton, aŭ uzas la *latinan* vorton *an*, aŭ la *francan* vorton *esque*. La sama dueco ekzistas por demonstrativaj adjektivoj kaj pronomoj : apud la normalaj, latindevenaj *iste* kaj *ille*, ekzistas kromaj formoj *esse*, *este* kaj *celle*. Sed oni devas elekti : en iu teksto, oni devas uzi **aŭ** tiujn de la unua grupo, **aŭ** tiujn de la dua, sen mikso !

Ortografio / Orthographio

Interlingua tre fieras uzi tre etimologie pravigeblan ortografion. Male de la franca, ĝi respektas la latinan ortografion en vortoj kiel *honor*,

abbreviation, stilo aŭ *imbecille*. Simile kiel la franca, vi renkontos en la lingvo vortojn kiel *elephante* aŭ *rhythmo* kaj pruntaĵojn kiel *rendez-vous* aŭ *kümmel*.

Sed iuj trovis tion tro malfacila kaj decidis sekvi lingvojn kiel la itala aŭ la hispana, kiuj reguligis sian ortografion. Sekve, oni ankaŭ povas trovi vortojn kiel *abbreviation* (unu b), *lira* (anstataŭ *lyra*), *elefante* aŭ *teatro*. Simile, en tiu plisimpligita lingvaĵo, oni skribos *mentalitat* por *mentalitate* aŭ *organizar* por *organisar*... Denove du lingvoj en unu.

Nu, tiaj strangaĵoj ne estas tiel gravaj, se vi nur *legas* la lingvon. Sed, se vi intencas *paroli* ĝin, vi frontos tute novan amason da obstakloj. Literoj ŝanĝas sian valoron en tre strangaj — sed ĉiam etimologie pravigeblaj — manieroj : ekzemple, g ĉiam prononciĝas kiel en Esperanto, krom en sufikso *-age*, sed *gi* foje prononciĝas kiel ĵ... Fina *-ia* foje estas *-ja*, sen akcento, foje *-ia*, kun akcento super la i... Ch povas esti aŭ ŝ aŭ k, foje

en la sama vorto, kiel *choches*, ŝokoj.

Cetere, la akcento ne nur sekvas multajn regulojn, sed eĉ spertas esceptojn : ĝi kutime estas sur la vokalo antaŭ la lasta konsonanto, sed pli ol dek

sufiksoj movas ĝin antaŭen, iuj verbaj finaĵoj havas neregulan akcenton, kaj iuj vortoj estas tute neregulaj. Tagonomoj — *lunedì, martedì, mercoledì* — neregule havas ĝin sur la lasta vokalo.



Interlingua fieras pri sia totala manko de kromsignoj, sed iu supersigno estus ja bonvena ĉi tie. Mi citu la francan gramatikon de Interlingua : « En résumé : il vaut mieux vérifier l'accent des mots dans un dictionnaire. » Same pri la prononco, laŭ mi...

Por lerni paroli la lingvon, vi ja povas aŭskulti ĉe Radio Interlingua (interretaj registraĵoj), sed vi atentu la hungarecan prononcon de la ĉefa parolisto : li diras « Interlingva » por Interlingua... Li eble prefere parolu nian lingvon...

Gramatiko

Se teksto en Interlingua ja aspektas tre latinida, ĝia Usona kreteamo tre certe enmetis en sian gramatikon multe da angla simpleco. Estas nur unu difina artikolo, *le*, plus la kunmetaĵoj *al kaj del*; substantivoj ne havas genron; adjektivoj ne varias laŭ nombro; verboj havas nur unu formon en iu tempo. En pluraj lokoj, oni asertas en la gramatiko, ke tio ĉi aŭ tio funkcias *como in anglese*: la uzo de artikoloj, ekzemple.

Kvankam ĝi iel konkurencas kun Esperanto, la gramatiko de Interlingua ne estas plej facila. Iuj substantivoj povas havi viran kaj inan formojn, kiel *Americano/Americana*, sed aliaj, tute ne, kiel *juvene*, *juna/junulo/junulino*. Kial tiu malpermeso? Nenial, laŭ mi. Verboj ekzistas en tri tipoj (kun finaĵoj *-ar*, *-er* kaj *-ir* en infinitivo), sed estas **paĝoj kaj paĝoj** da neregulaj participoj, kaj aliaj iom pli simpatiaj esceptoj. Konjunkcioj ekzistas en du formoj — ĉiam tiu dueco. Vort-ordo estas sufiĉe fiksa. Kaj oni trovas tre strangajn formojn, kiel *de plus in plus por pli kaj pli...*

Amuza eco de Interlingua, laŭ pluraj neniel pravigebla el uzoj en la fontlingvoj, estas la fakto, ke ekzistas (foje) malsamaj formoj por la komplementaj kaj la prepoziciaj personaj pronomoj. *Mi vidas lin* estas *io vide le*, *mi parolas al li* estas *io le parla*

(komparu kun la franca *je lui parle*), sed *mi laboras por li* estas *io labora* (aŭ *travalia*) *pro ille*. Jen la tabelo:

subj. obj. prep. posed.

1a pers. io me me mi

2a pers. tu te te tu

3a pers. vira ille le ille su

3a pers. ina illa la illa su

3a pers. neŭtra illo lo illo su

1a pers. nos nos nos nostre

2a pers. vos vos vos vostre

3a pers. vira illes les illes lor

3a pers. ina illas las illas lor

3a pers. neŭtra illos los illos lor

Ekzistas ankaŭ posedaj adjektivoj kun *-e* (*mie*, *tue*, *sue*, *nostre*, *vostre*, *lore*), kiuj metiĝas **post** la substantivo; ili ankaŭ uziĝas kiel posedaj pronomoj.

Krome ekzistas la pronomo *il*, por formoj kiel *pluvas: il pluve*.

Vortfarado

Gramatiko de Interlingua dediĉas plurdek paĝojn al la reguloj pri vortfarado, pri uzo de prefiksoj kaj sufiksoj. Sed tio fakte estas trompo: ne temas pri reguloj, sed pri simpla priskribo de la diversaj prefiksoj kaj sufiksoj de la vortoj pruntitaj el la

latinidaj lingvoj. Ekzemple, por -eco, oni renkontos la sufiksojn *-ismo* (*brutalismo*), *-itate* (*regularitate*), *-itude* (*certitude*), *-essa* (*politessa* aŭ *aptesa*) kaj *-ia* (*felicia*). Tiuj estas ekzemploj tiritaj el la gramatiko : la vortaro nur donas la vortojn *aptitude* kaj *felicite*... Estas do prave aserti, ke ne ekzistas reguloj pri tiuj afiksoj : eĉ Interlingvistoj ne certas pri sia propra lingvo !

Facila ĥaoso

Same kiel la angla, Interlingua aspektas facila je la unua rigardo, kvankam malfacila en pli profunda analizo. Ĝi forte apogis sin sur prestiĝa lingvofamilio, estas preskaŭ tuj legebla por centoj da milionoj da homoj kaj naskiĝis jam kun ampleksa vortaro. Iusence ĝi estas latinida lingvo por nekapabluloj, laŭ la titolo de fama libroserio. Eble ĝi tial spertis sian relativan sukceson. Alian kialon mi ne trovas.

Retejo : <http://www.interlingua.com/>

Wikipedio (plena je maŝintradukitaj artikoletoj) : <http://ia.wikipedia.org>

* Oni foje nomas *Interlingua* ankaŭ la lingvon *Latino sine flexione*, de la itala matematikisto Giuseppe Peano, kiu membris en IALA. Cetere, ekzistas alia lingvo kun la nomo *Interlingue* !

Kelkaj hindeŭropaj novaĵoj

La grupo dnghu, kiu celas revivigi la hindeŭropan lingvon kiel lingvon de la Eŭropa Unio, eldonis la unuan version de konversacia kurso, en la stilo Assimil : <http://dnghu.org/modern-indo-european/Modern%20Indoeuropean%20IE009.pdf>. Amuzu vin !

Alia lingvo, kun nomo dingwa (dnghu <—> dingwa!), bazita super la hindeŭropa vortaro, sed kun Esperantece regula gramatiko, estas proponata ĉe : http://www.deaneaston.com/index.php?p=1_7

Silvano **La Lacerto** Auclair

Esperanta libromarkato 2001-2010 : *Vojaĝo en Esperanto-lando ĉampiono de la jardeko*

Vojaĝo en Esperanto-lando de Boris Kolker okupis la unuan lokon en la furorlistoj de la Libroservo de UEA dum pluraj jaroj ekde la apero de ĝia reviziita kaj abunde ilustrita dua eldono en 2002. Ne mirinde, ke kun 3127 ekzempleroj tiu « perfektiga kurso de Esperanto kaj gvidlibro pri la Esperanto-kulturo » fariĝis la ĉampiono de la tuta jardeko 2001-2010.

[el Gazetaraj Komunikoj de UEA]

Pripensu : 100 W = la povon de 1 homa sklavo !

Francisko Lorrain

La puissance consommée par une simple ampoule de 100 watts équivaut à celle d'un esclave humain. Pensons-y quand nous laissons une ampoule allumée inutilement !

Kiom ofte ni lasas 100-vatan ampolon — aŭ eĉ kelkajn — lumi senutile dum horoj ! Se ni scius, kiom grandan povon tio reprezentas, ni certe estus malpli neglektemaj. Ni kalkulu.

La *energio* necesa por levi 10-kilograman mason je 1 metro estas

$$mgh = 10 \text{ kg} \times 9,8 \dots \text{ m/s}^2 \times 1 \text{ m} \approx 100 \text{ J},$$

t. e. 100 ĵuloj. Sekve la *povo* necesa por daŭre levi la saman mason je rapido de 1 metro sekunde estas proksimume

$$100 \text{ J} / 1 \text{ s} = 100 \text{ W},$$

t. e. 100 vatoj.

Imagu, ke vi devus levi 10 kilogramojn po 1 metro ĉiusekunde dum la tuta tago. Vi verŝajne post nelonga tempo elĉerpiĝus, kaj eĉ per vipo ne eblus igi vin daŭre tiel peni ! Oni povas kun certeco konkludi, ke 100-vata povo jam estas pli ol la maksimuma povo kelkhore liverbla de meza homo. Ni pensu pri tio, kiam venontjare ni eklumigos nian kristnaskan ampolaron ! Kiom da « sklavo » ni tiam eklaborigos ?



La Universitato de Teksaso en Dalaso bonvenigos NASK 2012 !

Le cours d'espéranto NASK (Cours d'été nord-américain) se donnera, cette année encore, sous une forme raccourcie mais intensive, du lundi 25 juin au mercredi 4 juillet — cette fois dans la ville ensoleillée de Dallas, Texas. Apportez vos chapeau texan, costume de bain, crème solaire et bottes de cowboy! Arrivez le 25 juin et repartez le 4 juillet, après huit pleines journées d'apprentissage et de divertissement. Vous pouvez déjà vous enregistrer : jusqu'au 22 mars vous bénéficierez d'un rabais de 50 dollars ! De plus des bourses d'étude sont offertes.

Por la dua fojo NASK (Nord-Amerika Somera Kursaro) prezentos mallongan kursaron (25a de junio ĝis 4a de julio), ĉi-foje en la sunplena Dallas, Teksaso. Do, portu viajn ĉapelon, naĝkostumon, kontraŭsunan kremon, kaj eĉ vakeraĵajn botojn! Alvenu la 25an de junio, kaj foriru la 4an de julio—



jen ok plenŝtopitaj tagoj de lernado kaj amuzo. La frua registriĝo, cetere, jam komenciĝis : aliĝu ĝis la 22a de marto kaj ŝparu 50 dolarojn !

La Universitato de Teksaso en Dallas (UT-D) estas rapide kreskanta universitato kun multaj novaj konstruaĵoj, meze de la granda urbregiono Dallas/Fort Worth. La NASKanoj loĝos kune en aparta « NASKejo » sur la kvara etaĝo de nova dormejo. Partoprenantoj loĝos en tri-homaj ĉambraroj ; ĉiu havos privatan dormoĉambron, sed dividos salonon, necesejon, kaj duŝejon. La dormejo estas klimatizata, kaj la klasĉambroj estas en la sama konstruaĵo. En la dormejo estas granda lavejo kun senpagaj lavmaŝinoj kaj sekigiloj. Oni havas senpagan aliron al la interreto (sed devas kunporti propran kablön « Ethernet »). La manĝejo estas je plaĉa sepminuta paŝado for de la dormejo, kaj tie troviĝas multaj diversaj pladoj, kiujn oni elektas laŭvole.

La internacia instruista teamo de Spomenka Štimec (Kroatio), Tim Westover (Usono), kaj Birke Dockhorn (Germanio) provizos tri nivelojn de lernado. Hoss Firooznia estos la help-instruisto kaj gvidos la eksterklasajn programojn.

Ĉi-jare la studentoj povos veni iom pli frue por la Landa Kongreso de Esperanto-USA, samloke kaj en la sama loĝejo (22-25a junio). Oni faru apartajn aranĝojn ĉe www.esperanto-usa.org.

La tuta kosto por NASK 2012 (kursoj, loĝado, manĝado) estos : 625.00 US\$ ĝis la 22a de marto, kaj 675.00 US\$ poste. Stipendia helpo haveblas por plentempaj studentoj kaj instruistoj, kaj loĝantoj de latinamerikaj landoj.

Por pli da informoj, kontaktu Ellen M. Eddy, administranton, eddyellen@comcast.net, aŭ vizitu la NASK-retejon (<http://esperanto.org/nask>).

Se vi subtenas la ideon de NASK kaj aliaj Esperanto-instruaj iniciatoj de ESF, sed ne povas persone partopreni en NASK, konsideru donaci al la kampanjo « 100.000 EUR por ESF »: <http://kampanjo.ikso.net/eo> !



[el [Esperantic.org](http://esperantic.org)]

Ĉu fino de la Libroservo de KEA ?

Normando Fleury

Mi respondecas pri la libroservo de KEA (Kanada Esperanto-Asocio) ekde 1984, sed fine de la jaro 2012 mi volas transdoni tiun respondecon. Ne pensu, ke temas pri grandega laboro, ĉar homoj mendas malpli ol antaŭ dek jaroj. Tamen, vi devas havi bretaron de 5 bretoj ĉ. du metrojn longaj. Necesos, ke vi iru al la poŝt-oficejo unu fojon ĉiumonate por sendi mendojn kaj ke vi pretigu la financon raporton fine de la jaro.



Se neniu anoncos sin, la servo malaperos kaj Esperantistoj devos mendi librojn de Esperanto-USA aŭ de aliaj libroservoj en Eŭropo kiel tiu de UEA, FEL aŭ Espéranto-France.

Kontaktu min, se vi volas scii pli pri la diversaj taskoj necesaj por mastrumi la servon : normandfleury@esperanto.qc.ca

La Universala Lingvo: nun havebla DVD-e !

Le réalisateur américain Sam Green (candidat aux Oscars en 2004) vient de publier en format DVD son documentaire *The Universal Language*, sur l'histoire de l'espéranto. Sam Green est un documentariste de renom, qui s'intéresse particulièrement aux utopies.

La nova dokument-filmo pri la historio de Esperanto farita de usona Oskar-nomumita reĝisoro Sam Green estas disponebla sur DVD.

La Universala Lingvo, produktita kun financa subteno de Esperantic Studies Foundation, prezentas la tumultan historion kaj humanismajn idealojn malantaŭ Esperanto. Uzante la historiajn registraĵojn kaj intervjuojn kun nuntempaj Esperanto-parolantoj, la filmo montras pasion, aktualecon kaj humuron en la homoj, eventoj kaj ideoj, kiuj vivtenis la movadon tra la plej mallumaj periodoj de la lasta jarcento.

Tiu ĉi filmo estas unu el la kronikoj de Sam Green pri utopia pensado kaj praktikoj. Tiu projekto demandas la simplajn demandojn pri tio, kiel



idealoj kaj idealismo povas instigi (aŭ ne instigi) historian ŝanĝiĝon. Aldone al bazaj informoj pri la historio de Esperanto, tiu ĉi rekta kaj fascina dokumentfilmo servas kiel perfekta diskutobjekto, interalie, pri la kunteksto de politika agado, sociaj movadoj, lingvaj studoj, eŭropa historio, espero kaj malespero en la hodiaŭa kultura klimato.

La filmo desegnas linion ekde la naskiĝo de la lingvo en la Rusa Imperio, tra la optimismo de la fruaj 1900-aj jaroj, du mond-militoj, la ideologia divido de la Malvarma Milito, kaj la komenco de la tutmondiĝo, kaj ĝi metas Esperanton en pli larĝan kuntekston de sociaj kaj politikaj luktoj. Kiel rezulto aperas portreto de kompleksa utopia projekto, sufiĉe rezista por elteni malfacilaĵojn, sed tamen ankoraŭ grandparte marĝena kaj ignorata.

Sam Green estas dokumentfilma reĝisoro el San-Francisko. Lia filmo *The Weather Underground* estis nomumita por Oskar-premio en 2004. Ĝi estis montrata en la usona publika televido kaj en la ekspozicio Whitney Biennial. La plej lastatempa dokumentfilmo de Sam Green — *Utopia in Four Movements* (Utopio en Kvar Movimentoj) — premieris dum la film-festivalo Sundance en 2010 kaj estas vaste montrata. Liaj aliaj filmoj inkluzivas *Utopia Part 3: the World's Largest Shopping Mall*, *lot 63*, *grave c*, *The Rainbow Man/John 3:16*, *N-Judah 5:30*, kaj *Pie Fight '69*. Sam Green ricevis magistran diplomon de la Universitato de Kalifornio, Berklio, kie li studis dokument-filmadon kun konata reĝisoro Marlon Riggs. Sam Green ricevis subvenciojn de la organizo Creative Capital, fondaĵoj Rockefeller kaj Guggenheim, kaj ankaŭ de usona fondaĵo National Endowment for the Arts. Li ankaŭ havas sian ekspozicion en la Exploratorium-muzeo de San-Francisko.

La Universala Lingvo estas nun aĉetebla per la interreto ĉe <http://esperantodocumentary.com/en/store>. Se vi aŭ via organizo volus aldoni tiun ĉi filmon al via kolekto aŭ se vi volus organizi publikan montradon de ĝi, bv. kontakti Sam Green retpoŝte Samgreenfilm@gmail.com aŭ telefone 1-415-345-7716.

[el Esperantic.org]

Ĉu nova loko por la biblioteko ?

Normando Fleury

Iam en 2013, la biblioteko de ESK devos trovi novan lokon. Ĝi gastis en nia domo dum la lastaj 30 jaroj, sed baldaŭ ni transloĝiĝos kaj ne plu eblos ĝin konservi ĉe ni.

Kiu pretas gastigi ĝin ? Ne necesas havi grandegan spacon. Temas pri eble 20 kestoj da libroj kaj arkivoj. Ideale, tiu loko estu foje alirebla al la membroj de ESK. La persono, kiu respondecos, devos ankaŭ prizorgi pruntadon, sed tio ne estas granda tasko, ĉar malmultaj personoj pruntas librojn.

Pripensu, ĉu vi havas liberan spacon ĉe vi ? Ĉu vi pretus gastigi la libron por almenaŭ 5 ĝis 10 jaroj ?



Google Traduction a ajouté l'espéranto


Déjà utilisable depuis longtemps comme langue d'interface de Google, l'espéranto vient de franchir une nouvelle étape. Ce qui a été annoncé 22 février 2012, par Brants Thorsten, chercheur scientifique chez Google Traduction (Google Translate), est déjà réalisé : l'espéranto est l'une des 64 langues de traduction automatique de Google Traduction. Son message peut être lu en anglais sous le titre en espéranto : Tutmonda helplingvo por ĉiuj homoj (Une langue auxiliaire mondiale pour tous les hommes).

Il est donc possible d'obtenir la traduction de ce message en 63 autres langues, dont le français, l'espéranto, etc. En matière de sites de traduction automatique, les usagers de l'espéranto

disposaient jusqu'à maintenant et disposent toujours de :

- Traduku.net
- Apertium
- GramTrans
- itranslate4.eu

Google Traduction donne donc une nouvelle dimension et plus de visibilité à la langue. Ce nouveau pas contribuera aussi à la disparition de préjugés. Les spécialistes ont en effet été surpris par la qualité des résultats par rapport à bon nombre de langues. Voici un extrait du message de Brants Thortsen en traduction automatique vers le français :



L'équipe Google Translate a été réellement surpris de la qualité de la traduction automatique pour l'espéranto. Comme nous le savons à partir de nombreuses expériences, des données de formation plus (ce qui dans notre cas signifie traductions existantes plus) tend à produire de meilleures traductions. Pour l'espéranto, le nombre de traductions existantes est relativement faible. Allemand ou espagnol, par exemple, ont plus de 100 fois les données; autres langues sur lequel nous concentrons nos efforts de recherche ont des quantités similaires de données que l'espéranto, mais n'atteignent pas encore une qualité comparable. L'espéranto a été construit de telle sorte qu'il est facile à apprendre pour les humains, et cela semble pour aider la traduction automatique ainsi. Bien que le système est encore loin d'être parfait, nous espérons que notre dernière addition vous aide à en apprendre davantage sur l'histoire de l'espéranto et de la culture.

Le résultat n'est donc ni entièrement bon, ni entièrement mauvais. Des améliorations sont prévisibles, car l'espéranto est enfin considéré avec sérieux d'un point de vue professionnel. Il bénéficiera donc d'une meilleure attention et sans doute de moyens qui lui ont toujours manqué.

De l'avis d'Eckhard Bick, de l'Institut des Langues et de la Communication de l'Université du Sud-Danemark, spécialiste en la matière, l'anglais se

prête mal au rôle de langue-pont : « L'anglais fonctionne mal comme langue-pont pour Google, par exemple entre le danois et le suédois. Dans notre firme [GramTrans] nous traduisons ou directement, sans langue-pont, ou avec une langue-pont typologiquement très parente, soit avec la langue source, soit avec la langue de destination (le cas des langues scandinaves entre elles)». Eckhard Bick a réalisé la traduction automatique en espéranto de la version complète en anglais de Wikipedia (3 874 611 articles) sous le nom de WikiTrans. »

Un superbe cadeau de Google pour le 125ème anniversaire de l'espéranto !

[el la dissendolisto de Henri Masson]

Noto de la redaktoro

1) La interesa demando, kiu restas, estas kiujn tekstojn uzis Google por « trejni » la traduk-sistemon? Ĉu ili uzis WikiTrans (aŭ tiujn artikolojn en Vikipedio, kiujn ebligis WikiTrans)? Au eble la tekstojn haveblajn en Lernu.net? Fakte, ni starigis tiun demandon al Google, kaj ni nepre informos vin, se ni ricevos la respondon.

2) Entajpu en vian serĉilon la vortojn "Google", "Esperanto" kaj "64". La kvanto da mencioj estas vere impresa !



BÉPO

Silvano Auclair

La disposition de clavier BÉPO, « francophone, ergonomique et libre », inspirée des mêmes principes que la célèbre disposition Dvorak, a été optimisée pour le français, mais permet aussi de taper des textes dans la plupart des langues européennes utilisant l'alphabet latin, dont l'espéranto. Elle est gratuite et peut être installée sur tous les ordinateurs.

En mia laboro, mi multe tajpas, kaj estas avantaĝe al mi tajpi rapide kaj efike. Ĉar estas pli malpli la



kazo de preskaŭ ĉiuj en la nuna tempo, estus por ĉiuj avantaĝe uzi kiel eble plej efikan klavararanĝon.

Eble ne ĉiuj scias, ke la kutime nuntempe uzataj tajpoklavaroj estis aranĝitaj tute sen scienca pristudo. Fakte, la klavaro QWERTY (laŭ la nomo de la unuaj ses klavoj de la dua rango) kaj ĝiaj modifoj (kiel la franca AZERTY) havis kiel celon la

malplirapidigon de la tajpado. Pli-ol-40-jaruloj eble memoros la malnovajn tajpilojn, en kiuj la klavoj movis frapilojn. Foje okazis, ke la frapiloj kunmiksiĝis. Por eviti tion, necesis aranĝi la klavojn, por ke ĉiu frapilo havu tempon reveni antaŭ ol leviĝis alia, des pli se ili kuŝis unu apud la alia.

Estas ankaŭ amuze rimarki, ke ĉiuj literoj de la angla vorto *typewriter* situas sur la dua rango : la unuaj vendistoj de usonaj tajpiloj ne vere bone tajpis, sed tamen devis kapabli montri kiel uzi iliajn vendotaĵojn...

Same kiel Zamenhof kreis Esperanton por racie solvi la lingvan problemon, iuj klopodis racie solvi tiun nun pli kaj pli ĉies problemon. La unua estis la Usonano August Dvorak, kiu longe pristudis la uzon de literoj en la angla lingvo por naski sian klavaron. Oni poste kreis similajn klavarojn por aliaj lingvoj.

Mi persone pli kaj pli uzas klavaron inspiritan de la samaj ideoj. Por la franca, almenaŭ tri ekzistas, sed mi elektis la aranĝon BÉPO (laŭ la unuaj kvar literoj de la dua rango), kiu estis komune evoluigita de



grupo da homoj, kiuj ne nur konsideris la bezonojn de la franca lingvo, sed ankaŭ komputilajn bezonojn kaj eĉ aliajn lingvojn : per tiu klavaro, eblas skribi **ĉiujn** latinliterajn eŭropajn lingvojn, inter kiuj Esperanton. Plus la grekajn literojn, por sciencaj uzoj.

Se vi rigardas la aranĝon, vi vidos diversajn principojn malantaŭ la klavaro. Vokaloj ĉiuj estas sub la maldekstra mano. Neliteraj karakteroj estas en la mezo. Kiam interpunkcioj venas pare (kiej krampoj), la du karakteroj estas apudaj.

Fremdaj literoj kaj supersignoj estas lokitaj en logikaj lokoj : ß ĉe S, € ĉe E, la haĉek-supersigno (kiel

en la kroataj literoj ŝ aŭ ž) ĉe V, pro la formo, kaj tiel plu.

Kompreneble, la klavaro estas optimuma por la franca. Se vi per BÉPO skribas Esperanton, la litero K estas en malkonvena loko, la literojn J kaj N vi devos tajpi per la sama fingro, kaj, kvankam la cirkumflekso konvene sidas en la mezo, kaj hoko metinda super ŭ estas en fora angulo, ĉe la klavo W (tamen logika loko, ĉu ne ?).

La klavaro BÉPO estas senpage instalebla en ĉiujn komputilojn : www.bepo.fr

Esperanto-renkontiĝoj

19-21a de majo 2012 : 9a MEKARO (Mez-Kanada Renkontiĝo de Esperanto)	Kebeko, Kebekio
22-25a de junio 2012 : Landa Kongreso de Esperanto-USA	Dalaso, Usono
25a de junio – 4a de julio 2012 : NASK	Dalaso, Usono
28a de julio - 4-a de aŭgusto 2012 : Universala Kongreso de Esperanto	Hanojo, Vjetnamio
5-11a de aŭgusto 2012 : Internacia Junulara Kongreso	Hanojo, Vjetnamio
6-8a de oktobro 2012: ARE	Silver Bay, NY
18-20a de majo 2013 : 10a MEKARO	Otavo, Ontario
17-19a de majo 2014 : 11a MEKARO	Granby, Kebekio
provizore: 12a MEKARO (2015) : Toronto (Ontario) ; 13a MEKARO (2016) : Sherbrooke (Kebekio)	

Montrealaj Esperanto-Kunvenoj (MEK)

<i>Tago</i>	<i>Dato</i>	<i>Horo</i>	<i>Loko</i>	<i>Temo</i>
Vendredo	30a de marto 2012	19 h 30	MEDO	Irlanda vespermanĝo (alportu ion !)
Vendredo	13a de aprilo 2012	18 h*	Commensal (sube)	
Vendredo	27a de aprilo 2012	19 h 30	MEDO	
Vendredo	11a de majo 2012	18 h*	Commensal (sube)	
Vendredo	25a de majo 2012	19 h 30	MEDO	
Vendredo	8a de junio 2012	18 h*	MEDO	Kolumbia vespermanĝo (alportu ion !)
Vendredo	14a de septembro 2012	18 h*	Commensal	Jarkunveno de ESK
Vendredo	28a de septembro 2012	19 h 30	MEDO	Japana vespermanĝo (alportu ion !)
Vendredo	12a de oktobro 2012	18 h*	Commensal (sube)	
Vendredo	26a de oktobro 2012	19 h 30	MEDO	
Vendredo	9a de novembro 2012	18 h*	Commensal (sube)	
Vendredo	30a de novembro 2012	19 h 30	MEDO	
Sabato	15a de decembro 2012	18 h*	Commensal (supre)	153-a datreveno de L.L. Zamenhof

Noto : manĝo je la 18-a , babilado ekde 19 h 30

Commensal St-Denis (restaurant végétarien — rue Saint-Denis) : 1720, rue St-Denis (entre Maisonneuve et Ontario, métro « Berri-UQAM »), Montréal. http://www.commensal.com/fr/ou/restaurants/saint_denis

MEDO (Montreala Esperanto-Domo) • 6358-A, rue de Bordeaux • Montréal • H2G 2R8



Esperanto-Societo Kebekia
Société québécoise d'espéranto

La Riverego estas eldonata de la Esperanto-Societo Kebekia kvarfoje dum la jaro : marte, junie, septembro kaj decembre. Pri la enhavo de la artikoloj respondecas la aŭtoroj mem. Oni rajtas kopii la artikolojn, kun nepra indiko de la fonto. Senpage por la membroj de la ESK. UEA-kodo de la Societo: kebk-d.

Redaktado kaj grafiko: Yevgeniya Amis (riverego(ĉe)esperanto.qc.ca).

Korektado kaj lingva konsilado: Silvano Auclair kaj Francisko Lorrain.

Estraranoj de ESK: Normand Fleury (prezidanto), Ian Wheeler (vic-prezidanto), Sylvain Auclair (sekretario-kasisto), Suzanne Roy (konsilanto), Den Drown (konsilanto).

Limdato por la venonta eldono /

Échéance pour le prochain numéro : 2012.5.20

En plus de la Société québécoise d'espéranto, il existe au Québec plusieurs clubs d'espéranto. Pour ajouter votre club à cette liste ou annoncer une activité, écrivez-nous à **riverego(à)esperanto.qc.ca**

Montreala Esperanto-Domo (MEDO)
6358-A, rue de Bordeaux, Montréal, H2G 2R8

(Vidu retejon por vidi kiel atingi)

(Voir site web pour un plan d'accès)

Libroservo, biblioteko nepre kun antaŭa rendevuo
Librairie, bibliothèque sur rendez-vous seulement

La Riverego (*Le Fleuve*) est publié par la Société québécoise d'espéranto quatre fois par année, en mars, juin, septembre et décembre. Dépôts légaux : Bibliothèques nationales du Canada et du Québec. Premier trimestre 1986. ISSN 1923-1067. Le contenu des articles est sous la responsabilité des auteurs. La reproduction des articles est permise avec mention obligatoire de la source. Gratuit pour les membres de la Société québécoise d'espéranto.

Rédaction et graphisme: Yevgeniya Amis (riverego(à)esperanto.qc.ca).

Correction: Sylvain Auclair et François Lorrain. **Administrateurs de la SQE:** Normand Fleury (président), Ian Wheeler (vice-présidente), Sylvain Auclair (secrétaire et trésorier), Suzanne Roy (conseillère), Dan Drown (conseiller).

6358-A, rue de Bordeaux • Montréal • H2G 2R8
info@esperanto.qc.ca • www.esperanto.qc.ca

Service de librairie postale à Montréal

La libroservo de KEA en Montrealo akceptas mendojn rete kaj letere. Konsultu la retejon por pliaj informoj.

Service de librairie postale à Montréal

Le service de librairie de KEA accepte les commandes par courriel et courrier. Consultez le catalogue en ligne.

www.esperanto.qc.ca/katalogo

Pasporta Servo

Aliĝu tuj se vi volas esti gastiganto kaj bonvenigi esperantistojn ĉe vi :

www.pasportaservo.org.

Vi povas ankaŭ kontakti Ĵenja Amis (yevgeniya.amis(ĉe) gmail.com), kiu estas la peranto por Kanado.